

# KRESKO 5

2018 aprilo

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

## Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas ...

Ĉiuprintempe mi ĝuas la belan vidaĵon malantaŭ mi domo: sur la herbejo du pomarboj en plena florado brakumas sin! Ili aĝas pli ol duonjarcenton, sed staras obstine, malgraŭ vundoj, kiujn al ili faris ŝtormoj kaj aliaj malbonaĵoj de la vivo. Ili ĉiujare donas abundajn fruktojn, ĉar ili apartenas al iu malnova specio, rezistebla kontraŭ plantaj malsanoj. Ili bezonas nenion, sed donas multon!

Jam de jaroj mi meditas pri la Esperanto-movado, kaj ripete tre malĝojas, ĉar en ĝi plej multe aktivis maljunaj esperantistoj. Dum jardekoj ni reklamas Esperanton, eldonas lernolibrojn kaj en kursoj instruas la lingvon al gejunuloj. Sed tiuj kursfinintoj en niaj vicoj restas nur mallonge. Ili ne estas tiu hardita speco de esperantistoj, kiu al la movado dediĉas la tutan vivon, ĉiujn siajn kapablojn kaj fortojn. Aŭ eble mi eraras! Eble ankaŭ tiuj gejunuloj, kiuj nun devas zorgi pri sia edukado, trovado de laboro, aĉetado de loĝejo, geedziĝo, infanoj ... iam revenos al ni.

Zamenhof skribis, ke *cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas...* kaj li pravis. Ni, la harditaj movadanoj, estas semantoj, kiuj en la grundon de Esperantujo ĵetas multajn semojn en formo de kursoj kaj novaj kursfinintoj, sed tiuj semoj malofte aŭ nur mallonge fruktas tuj post la semado. Ili perdiĝas dum jaroj, kaj foje nia laboro al ni aspektas vana.

Se ni rigardas nian semadon el alia angulo, eble ni komprenos, ke ĉiu semado, malgraŭ perdiĝo de semoj, estas investo en la estontecon, sed ĝian fruktadon ni ne povas antaŭvidi kun certeco. Ni ne povas scii kiom da semoj perdiĝos, kiom da ili ripozos dum jardekoj aŭ donos dolĉajn fruktojn iam ajn. Nia semado estas klopodo fari ion por plibonigi nian staton. La rezultoj ne ĉiam estas kalkuleblaj nek

prognozeblaj, sed nia laborinvesto estas borso, en kiu oni ofte perdas kaj nur malofte gajnas! Kiel ajn nia semado funkcias, ĝiajn verajn konsekvencojn ne vidos la semantoj, sed nur postaj generacioj.



En tia pensado mi revenas al la du pomarboj, kreskantaj malantaŭ mia domo. Se iam miaj geavoj estus pensintaj, ke ili ne ĝuos la fruktojn de la pomarboj, kiujn ili plantis antaŭ multaj jaroj, ili ne plantus ilin! Sed ili unauvice pensis ne pri si mem, sed pri siaj posteuloj, la generacio, kiu nun kolektas la fruktojn de ilia laboro.

Same devus esti en nia movado. Se nun al ni ŝajnas, ke niaj

aktivecoj donas nenian rezulton, ke ili estas malŝparo de la tempo kaj niaj fortoj, ni tamen ne ĉesu aktivi! Nia movado nek komenciĝis kun ni, nek ni estas la lasta ĝia generacio. Ni rememoru pri antaŭaj aktivuloj, kies rezultojn ni nun ĝuas. Kaj tiu pensado estu motiviga por ni! Ni ne pensu, ke nun estas malbona tempo por Esperanto, ĉar ni konis pli favorajn cirkonstancojn. Ni laboru plue, ni semu same kiel niaj antaŭuloj. Eble ni ne vidos la rezultojn de nia laboro tuj, sed multaj el niaj kursfinintoj iam eksentos agrablan vibron ĉe la ekspenco pri bona kaj bela tempo de ilia juneco, kiam ili lernis Esperanton. Eble ili estos maljunaj kaj nefortaj kiam ili retrovos la entuziasmon de sia juneco. Eble ili ne povos plenumi taskojn en niaj societoj, sed ili povos morale kaj materie subteni nian movadon. Kaj multaj tion faras jam nun! Ĝis kiam ekzistas semantoj, ekzistos ankaŭ novaj plantoj kaj novaj fruktoj. Antaŭ ĉio ni klopodu kunigi la novon kun la malnovo, ĉar konstrui ĉiam dekomence estas pli malfacile, ol se la fundamento jam ekzistas!

*Josip Pleadin*



## 9-a Tut-Amerika Kongreso Esperanto

Havano, Kubo  
11-17 februaro 2018

Kubo denove malfermis la pordojn al esperantistoj kaj okazigis la **9-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto** en Havano. Al la aranĝo aliĝis 240 partoprenantoj el 20 landoj, inter kiuj, krom latinamerikanoj, usonanoj kaj kanadanoj, ĉeestis pluraj eŭropanoj kaj gesamideanoj el Japanio kaj Koreio.

La kongreso disvolviĝis en la hotelo *Panamerikano* en la orienta parto de Havano. Je dispono estis naĝejo, kie okazis interkona kaj internacia vesperoj, Esperanto-kabaredo kaj la adiaŭa festo.

La kongresa temo *Lingvoj kaj kulturo: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj* celas alproksimiĝon, edukadon kaj konduton de la homoj por favora agado, kiu estu utila por la planedo kaj por la estonteco de la homaro. La temon enkondukis kaj reĝisoris la prezidantino de la Kuba Esperanto-Asocio **Maritza Gutiérrez Gonzáles**. Ŝi ankaŭ prezentis kaj donis informojn pri sia lando kaj pri la elsendoj en Radio Havano Kubo. **Juan Ramón Rodríguez Gómes** resumis la TAKE-kongresojn ĝis nun okazintajn.

La solena inaŭguro okazis en la teatro de la Nacia Belarta Muzeo kun la ĉeesto de la vicministro de la kulturo **Fernando Rojas** kaj aliaj eminentaj gastoj. Tuj poste komenciĝis diversaj programeroj, kiuj daŭris la tutan semajnon.

La programo estis vere riĉ-enhava. Krom pri la kongresa temo okazis diversaj prelegoj kaj prezentoj, konversaciaj rondoj, forumoj, kant-, danc- kaj instruatelieroj, libroprezentadoj, origamio, tabluludoj, kvizoj, ILEI-kunsido, literatura rondo, aŭkcio. Oni parolis pri ĝemelaj urboj, pri

radioamatoroj, pri tradicia kuba vestaĵo Guayabera, pri Yumeiho terapio kun praktika elmondo. Ni eksciis pri la kuba folkloro muziko, pri historio de Esperanto en Santiago de Kubo, pri la kultura projekto de la kantgrupo *Amindaj* kaj ilia premio ricevita en la Internacia Festivalo de Filmetoj *Teo kaj Amo* kaj estis prezentita la lasta dokumentfilmo *Lekantoj el kristalo*, kiu rakontas vivon en la montaro. Okazis forumo pri konsciigo kaj kapablo, UEA kaj ILEI ekzamenoj. Enkondukis prezenton por AMO-Seminario prezentis **Sara Spanó** la estraranino de UEA. **Francesco Maurelli** informis pri la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kies prezidanto li estas.

Oni parolis pri Zamenhofaro kaj pri Esperanto en la interreta mondo. Interesuloj eksciis kiel labori teame pri konfliktoj kaj iliaj solvadoj, ni akiris sciojn pri la plej gravaj aspektoj de la internacia Esperanto-movado, pri ĝiaj strukturo, historio kaj kulturo.

**Ariadna García Gutiérrez** tre interese rakontis pri sistemoj por organizi kaj reprezenti informojn, ilia stokado kaj transformprocezoj kaj manieroj organizi ilin. Pri la plej elstara pensulo de la 19-a jarcento, José Martí, prelegis poeto kaj eseisto **Juan Lázaro Besada**. **Maritza Gutiérrez González** kaj **Pedro Fernández Rodríguez** donis informojn pri la klubo José Martí kaj kunlaboraj rilatoj inter la Kultura Societo kaj KEA.

De **Harald Schicke** ni eksciis pri la germana sansistemo kaj pri sanigaj efikoj de korea ginsengo. **Orlando Raola** interese rakontis pri sia tridekjara perletera korespondado kun dokumentita kolekto tiatempa. Pri la influo de la subsahara Afriko en la kuban kulturon, ĉefe en religio, muziko, lingvo kaj pri Santerio kaj afrokuba etoso parolis **Juán Ramón Rodríguez Gomez**. **Julián Hernández Angulo**, konata pro sia kanto *Kien la mondo iras* parolis pri gvidado de teamo kaj donis konsilojn kiel fondi kaj organizi novajn lokajn grupojn, kiel flegi viglan kulturan vivon en la asocio. Alia lia prelego temis pri *Teoria kaj metodologia konceptigo por gvidado de la instrua kaj lerna procezoj de la*

*angla kaj Esperanto.*

**Vilhelmo Lutermano** parolis pri la Monda Asembleo Socia (MAS), precipe pri tradukado kaj eldonado de libroj. Li redaktas la francan monatgazon pri politikaj kaj kulturaj analizoj *Le Monde diplomatique* en Esperanto. Post la prelego li malavare disdonis plurajn librojn al reprezentantoj de kubaj asocioj en diversaj landopartoj. Pri SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) parolis kaj informojn donis **Floreál Gabalda**. Li ankaŭ atentigis pri la 91-a SAT-kongreso okazonta en Kragujevac ĉi-somere en Serbio. Mi menciis la fervojistan kongreson en Vroclavo (Pollando) en majo kaj invitis al partopreno en ĝi.

Ni spektis du kubajn amuzajn teatraĵetojn: *Emelina Cundiamor* kaj *Franciska kaj la Morto*, kiujn ni ege ĝuis. Nacia vespero okazis en la havana teatro *Retazos* kaj en la teatro *Raguel Revuelta* **Saša Pilipović** kaj **Georgo Handzlik** prezentis la teatraĵon *La Kredito*. Antaŭ la kongresejo estis prezentitaj ekzercoj de Ĉikongo sub gvido de **Mayra Núñez Hernández**.

Pluraj duontagaj ekskursoj permesis konigi al ni la ĉefurbon Havano kaj ĝian proksiman ĉirkaŭaĵon. Pluraj esperantistoj interesiĝis pri la ekskurso *Laŭ la vojo de Hemingway*. La tuttagaj ekskursoj celis pli forajn lokojn.

La semajnon antaŭ la kongreso okazis granda Librofoiro. KEA havis tie standon kaj donis informojn pri Esperanto kaj aktivadoj en Kubo. Multaj preterpasantoj interesiĝis. En la informejo de la kongresejo eblis aĉeti kelkajn esperantaĵojn kaj memoraĵ-objektojn. Ĉe la fino de la kongreso pluraj Kubanoj estis honorigataj pro meritplena poresperantalaboro. Neforgeseblaj estis bongustaj vespermanĝoj en diversaj restoracioj. Tiamaniere ni malkovris la manĝkutimojn de Kubanoj.

La 9-a TAKE estis tre sukcesa kaj donis al multaj Kubanoj, kiuj ne ofte povas vojaĝi eksterlanden eblecon konatiĝi kaj amikiĝi kun alilandanoj kaj konvinkiĝi, ke Esperanto bone funkcias kiel internacia lingvo. Korajn dankojn al la organizantoj.

*Liba Gabalda*

Ĥristina Kozlovska  
**Fabelo pri Talpo**  
*(Казка про Крома)*

Iam vivis Talpo. Li laboregis peze, tiel peze, ke li eĉ ne havis tempon por ripozi. Li fosadis tunelojn subtere, ĉesis nek tage nek nokte, skrappenetris per siaj piedoj tra malmola tero tiom forte, ke sango eliĝis el ili, tiom forte, ke li foje tute eluzis la ungojn, sed li fosadis kaj fosadis. La Talpo movis sin antaŭen rapide, sed li volis ankoraŭ pli rapide, la tero premis lin de ĉiuj flankoj, rezistante al la korpo de la Talpo, forskrapadis lian silkecan felon, sed la Talpo ne atentis tion, lia felo mudis, sed poste nova kreskis. La Talpo daŭrigis la fosadon. Pli kaj pli da tuneloj kuŝis malantaŭ la Talpo, sed estis la sama netrairebla muro antaŭ li, kaj la Talpo estis tratatanta tiun muron, denove kaj denove estis tratatanta, por ke liaj tuneloj plimultiĝu, por ke ili iĝu pli longaj. La okuloj de la Talpo konis neniun alian koloron krom la koloro de mallumo, la naztruoj de la Talpo konis neniun alian odoron krom la odoro de humida grundo. La Talpo laboregis pene, ho tiel pene, ĉar li sciis, ke baldaŭ liaj infanoj naskiĝos en la mondon. Kaj kiam liaj tri filoj naskiĝis, la Talpo ĵetis sin en la pezan laboron ankoraŭ pli intense, ĉar li havis jam iujn, por kiuj li vivu, iujn, kiujn li prizorgu. La Talpo forgesis eĉ kiel trovi spiron, li fosis kiel spiris, ĉiutage, ĉiuminute. Kaj la Talpo faris siajn tunelojn ĉiam pli kaj pli larĝaj, por ke liaj filoj neniam devu forskrapadi siajn felojn, kiel li estis farinta iam, por ke la tero ne premu ilin tiom senkompate en sia sino, kiel lin iam, li volis almenaŭ, ke ili, se al li ne estis destinite, sentu kio estas spaco, kio estas libereco. Kaj jam la filoj kreskis, kaj ankaŭ ili eklaboris, kaj ili sekvis sian patron kaj helpis lin.

– Filoj miaj, infanoj miaj, – la maljuna Talpo diris, – mi laboris la tutan mian vivon pene, por ke vi vivu pli facile, rigardu malantaŭen, jen estas centoj, miloj da kilometroj da larĝaj, vastaj



*Ilustris Oleh Loburak*

tuneloj, kiuj serpentumas, iru kaj loĝu tie, kaj daŭrigu nian genton.

– Ho ne, patro, – la infanoj kontraŭdiris, – ni ne volas viajn tunelojn, ankaŭ ni volas senti nin posedantoj, ni volas fosi niajn proprajn tunelojn, nelonge restas por ni vivi solaj, baldaŭ ankaŭ ni havos niajn proprajn familiojn, baldaŭ ankaŭ niaj infanoj naskiĝos en la mondon.

– Nu bone, – suspiris la Talpo, laca kaj elturmentita pro la laboro, sed kion li povis fari, – tiam almenaŭ per mia konsilo mi estos utila por vi, se vi ne volas miajn tunelojn.

Do la maljuna Talpo komencis doni konsilojn al siaj filoj kiel fosi pli rapide kaj en kiu direkto. Sed li mem ne evitis la laboron, skrappenetris per la dentoj en la teron tutforte por tamen ankoraŭ helpi siajn filojn. La tero premis lin, ne lasis lin spiri kaj ŝtopis liajn naztruojn. „Mi laboradis dum mia tuta vivo kiel sklavo, fosadis pli kaj pli larĝajn tunelojn, ĉar mi strebis al vasto, sed nun mi mortos sufokita de la grundo”, – pensis la Talpo kaj subiĝis al la sorto, lia korpo moliĝis, akceptante humile la tutan pezon de la ĉirkaŭa tero sur sin. Sed

estas amare morti tute sola, li volis almenaŭ vidi la infanojn antaŭ sia morto, la Talpo ekvigliĝis, streĉante ĉiujn siajn muskolojn, ekfosis furioze, ne domaĝante sian korpon, en la nigran teron. La lastaj restaĵoj de la fortoj forlasis la Talpon, sed la laboro bolis, li fosis tiel rapide, kiel neniam pli frue, kiel eĉ en sia juneco li ne fosis, sed forgesis la Talpo en sia ardo la vojon, laŭ kiu li ĉiam moviĝis, kaj ekfosis iom pli alten. Kaj la Talpo faris la finan spurton kaj tratatis sin al la tersurfaco. La bonodora freŝa aero frapis liajn naztruojn, kaj tiel forte, ke li eĉ eksentis kapturiniĝon. Kaj la Talpo ekvidis finfine la surfacajn kolorojn, kies ekziston li eĉ neniam suspektis antaŭe, la Talpo rigardis la ĉielon, kaj larmoj fluis malsupren de liaj okuloj, ĉar lia menso apenaŭ povis kompreni la belecon de la ĉielo. Sed pleje la Talpo estis impresita de la spaco, la senfina, eterna spaco, al kiu li estis strebanta sian tutan vivon, por kies plivastigo li fordonis sian vivon. Ĉar li estis certa, ke la spaco ne estas donata tiel simple, kaj ke por havi ĝin oni devas toleri dolorigan turmenton. Sed evidentiĝas, jen kie estas la spaco, evidentiĝas, ke li eĉ ne sciis, kio ĝi estas. Li tretis la sinon de la tero, boris ĝian internaĵon dum sia tuta vivo, ne konante ripozon, sed ĝis la libereco restis nur kelkaj centimetroj. Sufiĉis levi sian kapon kaj fosi iom pli alten. „Mi estas ĉi tie finfine, nun mi povas vivi kaj ĝui mian vivon.” La Talpo rememoris siajn filojn, volis reveni al ili kaj rakonti ĉion. La Talpo venkis, li batalakiris finfine de sia vivo tion, kion li ĉiam volis, la Talpo ne kapitulacis plene, sed jam delonge kapitulacis la korpo de la Talpo. Li provis movi sin, sed lia korpo ne obeis. Li povis nur klini sian kapon malsupren kaj krei al la tera firmaĵo:

– Filoj miaj, venu ĉi tien, sekvu mian voĉon!

Sed la filoj ne respondis kaj ne venis.

– Infanoj miaj, venu al mi, la tuta beleco de la mondo atendas vin – la Talpo ekkriis duafoje, ne rimarkinte, ke lia voĉo iĝis ankoraŭ pli mallaŭta kaj pli malforta.

Sed la filoj ankaŭ tiam ne venis, ĉar ili ne aŭdis sian patron. ➤

# Lulkanto por galanto

Vortoj kaj melodio: Luiza Carol

**Andante**

Am E Am E Am

Voice

dor mu ka ra beb ga lan to dor mu dum la ven ta kan to  
 nok ta frost kun a ĉa den to ram pas ki el fi ser pen to  
 beb kun ĉa po pin ta pun ta ve nas la prin tem po bun ta

5 Dm E7 Am C

Vc.

dor mu sub la neĝ ko vri lo dor mu en gla ci lu li lo dor mu beb de vent var  
 vo lus ĝi vin a ĉe mor di vo lus ĝi vin a ĉe tor di ka ŝu vin sub neĝ ko  
 ve nas ĝi kun sun ra di oj ve nas ĝi kun gaj aj kri oj dor mu beb de vent var

10 Dm E7 Am

Vc.

ti ta beb kun ver da ĉa po pin ta be bo kun pe tal su ĉi lo  
 vri lo si du en gla ci lu li lo fru ma te ne var mo ve nos  
 ti ta beb kun ver da ĉa po pin ta be bo kun pe tal su ĉi lo

15 E7 Am (3) (3)

Vc.

be bo kun fo li man ti lo  
 tuj la fros ton sun for pe los  
 be bo kun fo li man ti lo

Dormu kara beb-galanto,  
 dormu dum la venta kanto,  
 Dormu sub la neĝ-kovrilo,  
 dormu en glaci-lulilo.  
 Dormu beb' de vent' vartita,  
 beb' kun verda ĉapo pinta,  
 bebo kun petal-suĉilo,  
 bebo kun foli-mantilo.

Nokta frost' kun aĉa dento,  
 Rampas kiel fi-serpento,  
 volus ĝi vin aĉe mordi,  
 volus ĝi vin aĉe tordi.  
 Kaŝu vin sub neĝ-kovrilo,  
 sidu en glaci-lulilo.  
 Frumatene varmo venos,  
 tuj la froston sun' forpelos.

Beb' kun ĉapo pinta punta,  
 venas la printempo bunta,  
 venas ĝi kun sun-radioj,  
 venas ĝi kun gajaj krioj.  
 Dormu beb' de vent' vartita,  
 beb' kun verda ĉapo pinta,  
 bebo kun petal-suĉilo,  
 bebo kun foli-mantilo.



**Luiza Carol** naskiĝis la 1-an de marto 1947 en Bukareŝto (Rumanio), kaj esperantistiĝis en 2005. Ŝi estas instruistino pri la angla lingvo kaj piano, kiu loĝas en Israelo ekde 1980. Ŝi verkas, tradukas kaj publikigas poemojn, prozaĵojn, teatraĵojn, kantojn kaj eseojn en la rumana (ekde 1969), angla (ekde 1981) kaj Esperanto (ekde 2006), kaj nur malofte ankaŭ en la franca kaj hebrea. Pliajn informojn pri Luiza Carol vi povas trovi ĉe: <http://luiza.luch.co.il>

► – Filoj miaj, infanoj miaj,  
 mi scias, ke vi ne plu aŭdos min,  
 mi volas nur ke vi ĝis la fino iru  
 laŭ mia lasta tunelo – la maljuna  
 Talpo flustris kaj mortis, kvazaŭ li  
 neniam vivis.

Liaj filoj laboris dume. Sed  
 post iu tempo ili subite rememoris:

– Sed kien nia patro  
 malaperis? – ili demandis unu la  
 alian.

Ili sidis kaj malĝojis ioman  
 tempon, ekploris silente, sed ne  
 serĉis lin, ĉar ili sciis, ke li jam ne  
 estas en ĉi mondo. Kaj ili ekstaris,  
 ĉar ili devis komenci labori, ili ne  
 havis tempon por mediti pri vivo  
 kaj morto, tia estas la talpa vivo:  
 batali por spaco kontraŭ la tero  
 ĉiutage.

*Elukrainigis  
 Petro Palivoda*

## Prelegserio Forgesitaj samideanoj

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) daŭrigas la prelegserion *Forgesitaj samideanoj*, celante konigi al esperantistoj detalojn el la vivo de antaŭaj generacioj de kroataj esperantistoj.

La kvara prelego el tiu serio, anoncita por la 28-a de aprilo, je peto de kelkaj regulaj vizitantoj de la prelegserio, pro la festado de la 1-a de majo kaj tiuperiodaj liberaj tagoj, efektive okazos la **5-an de majo 2018**. Kiel kutime, ĝi komenciĝos je la 11h00 en la sidejo de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en Zagrebo, Radnički dol 1, kaj estos dediĉita al **MARINKO GJIVOJE - historiisto de Esperanto en Jugoslavio**.

La kvina prelego pri **BUDE BORJAN, la unua viktimo de la ustaŝa teroro**, okazos kiel anoncita la 26-an de majo je la 11h00.

Post la prelegoj oni povas ekscii novaĵojn el Esperantujo kaj aĉeti Esperantan literaturon.

Bonvenas ĉiuj zagrebaj, kroataj kaj eksterlandaj esperantistoj.

# Petro Palivoda poezias

## Muziko

*Solviĝos en muzik' esenco mia,  
per ondo kolizias kun etero,  
leviĝas super falso, super vero  
kaj perdas originon materian.*

*Foriĝos por eterne homaj limoj,  
al mi etendas manojn milionoj.  
Fluadas mi – jen bono, jen malbono,  
venen', balzam' inspiras la animojn...*

*...Vizi' degelis, estas mi en ordo,  
la samaj kavaj vangoj, sekaj lipoj...  
Violonisto arĉas jam ne kordojn,  
sed miajn ripojn.*

## Dezerto

*Ni iras daŭre,  
Mortas pro soifo.  
Ne sun karesas -  
pato ardigita.  
Sur niaj langoj  
vortoj sufokiĝas.  
Oazo...  
Ni iris daŭre,  
mortis pro soifo.  
Miraĝo...*

## Kompreno

*Mi komprenas:  
Tero estas globo,  
duoble du faras kvar,  
vintre estas tago plej mallonga,  
estas plej varme somere.  
Kiel multe mi komprenas!  
Kiel malmulte mi komprenas...*

## Ekvilibro

*Nek sur la tero  
nek en la ĉielo  
surfaco limigita estas  
per rektlinio.  
Sin levi en la ĉielon  
gravito baras.  
Por ne fali sur la teron  
ekvilibro necesas.*

**PETRO PALIVODA** (naskiĝis en 1959) estas ukraina kaj Esperanta poeto kaj tradukisto en Kievo. Liaj originalaj verkoj kaj tradukoj en la ukraina, rusa, germana kaj Esperanto aperis en diverslandaj ĵurnaloj, revuoj, almanakoj kaj antologioj. Esperantisto ekde 1976. Li tradukis la poezion de Lesja Ukrainka, Oleksandr Oles, Andrij Mališko, Oleksa Slisarenko, Vasil Atamanjuk, Dmitro Lucenko, Volodimir Dankeviĉ (el la ukraina en Esperanton) Bill Auld, Albert Goodheir, Baldur Ragnarsson, Mauro Nervi, Ludoviko Zamenhof, Hilda Dresen, Victor Sadler, Vasil Eroŝenko, Aleksandr Logvin, Eugeniusz Matkowski, Aivar Liepins, Julia Zigmond, Ĵomart Amzejev, Julio Baghy (el Esperanto en la ukrainan), Julián Marchena (el la hispana en la ukrainan), Martin Kirchhof, Renate Eggert-Schwarten (el la germana en la ukrainan), Johann Wolfgang von Goethe (el la germana en la rusan), Tetjana Ĉernecka, Miĥail Taniĉ (el la rusa en la ukrainan) kaj prozon de Kalle Kniivilä, Ulrich Becker, Guido Hernandez Marin (el Esperanto en la ukrainan) Anton Meiser, Manfred Welzel (el la germana en la ukrainan), Ĥristina Kozlovska (el la ukraina en Esperanton kaj en la germanan). Laŭreato de *Liro-82*, Kaliningrad, Rusio (3-a premio, poezio), de la internacia Esperanta literatura konkurso *EKRA-2006*, Razgrad, Bulgario (1-a premio, poezio), de Ukrainia ukrainlingva literatura konkurso *Rukomeslo-2006*, Kievo: poezio - 3-a premio; traduko - 2-a premio (rakonto de Ulrich Becker el Esperanto en la ukrainan lingvon), de la Tutukrainia festifalo de ukraina moderna estrada kanto *Pisennij vernisjaĵ-2006* kiel aŭtoro de la teksto de laŭreata kanto, gajninto de la Tutukrainia literatur-muzika konkurso *Inspiro* en la branĉoj „Originala poezio” kaj „Tradukita poezio” (Kolomeo, 2015). En 2004-2012 li estis juĝantarano de la Internacia literatura konkurso „Liro”. Liaj poemoj estas tradukitaj en la germanan kaj la kroatan lingvojn.



## Evoluo

*senhejma hundo  
feliĉon havis  
sed duone  
ĝi trovis sur balaĉejo  
peceton da kolbaso  
sed tuj ricevis ĝia dorso  
senprokraste  
celtrafan frapon  
per bastono  
de vagabondohomo  
konkuranta  
ĝi devas ja memori  
ke homo estas  
krono de l' Naturo*

## Pendolo

*Tien – ĉi tien,  
tien – ĉi tien.  
Mi haltos –  
  
kaj tempo haltas.  
De mi dependas  
ĉu morgaŭ estos.  
En knar' de ĉeno mia  
hieraŭo estis.  
Trankvilo mia  
morto estas.*

## Ĝardeno, kiun ni povas havi en poŝo

Homo estas tia estaĵo, kiu dum la vivo havas la bezonon interrilati, komuniki, priparoli la informon, kiu impresis aŭ devigis lin mediti kaj eterne restis en liaj pensoj kaj koro. Ni ĉiam impetas rakonti pri nia ŝatata filmo, muzikaĵo aŭ literaturaj verkoj al konataj kaj nekonataj homoj, dezirante, ke ili spektu, aŭskultu kaj legu la samon.

La samo okazas ankaŭ se ni havas ian ŝatokupon. Rememorante niajn unuajn paŝojn en Esperanto, krom la rakontojn pri la lingvo kaj ĝia lernado, ni konigas al la geamikoj la unikaĵojn de Universalaj Kongresoj, renkontiĝoj kaj vojaĝoj en Esperantolando.

Multege da esperantistoj vere ne imagas sian vivon kaj laboron ekster Esperantujo. Muzikistoj verkas kanzonojn, verkistoj skribas originalajn rakontojn kaj poemojn, kaj tradukantoj Esperantigas famajn aŭ nesufiĉe konatajn verkojn el naciaj literaturoj al Esperanto.

La plej bona kaj plej mirinda estas la fakto, ke esperantistoj ne avaras laŭdi kaj diri bonajn vortojn. Eble la universala lingvo havas la forton formi novan, pli bonan kaj pli perfektan homon? Verŝajne ĉi tiu fantasta deflankiĝo aperis kiel rezulto de la komenca ideo de Zamenhof – la kreanto de nia lingvo.

Revenante al la natura homa deziro disdoni la bonajn pensojn al aliaj homoj, ni povas konstati, ke ĉiu el ni havas ŝatatan verkon (rakonton, novelon, legendon) aŭ plurajn tiajn en la nacia aŭ eksterlanda literaturoj.

Kompreneble, ĉiu havas sian subjektivan opinion, sed oni diras ke „*La perlo povas plaĉi aŭ ne plaĉi, sed ĉiu rimarkas ĝian belecon*”.

Similaj „perloj” estas en nia tutmonda literaturo kaj en ĉiu nacia literatura trezorejo. Dank’ al niaj aktivuloj, kiuj agadas en Esperanto, jam formiĝis aparta Esperanto-kulturo.

Abundo da tradukitaj kaj originalaj prozaj verkoj kaj poemoj, kiuj aperadas ĉu libroforme, ĉu en

retaj grupoj, ĝojigas kaj mirigas nin. La Esperanta literatura „vernisaĵo” pleniĝas je interesaj kaj belegaj verkoj famaj, aŭ ne al ĉiuj konataj.

Se ni parolas pri la originalaj verkoj, estas rimarkeble, ke niaj literaturaj diferencas je tio, ke ĉiu aŭtoro montras kaj ion sian (nacion), kaj la individuan kapablon kaj talenton.

Ekzistas ĉiujaraj Belartaj konkursoj de UEA kaj bonege pripensita kaj gvidata paĝaro de verkistoj ([www.verkoj.com](http://www.verkoj.com)), en kiu la reta leganto povas trovi belegajn poemojn kaj rakontojn de diversaj aŭtoroj (niaj samideanoj), atenti novaĵojn kaj mem partopreni en la originala kaj traduka laboro, prezentante sian verkon.

Ĉiu esperantisto, kiu povas kaj volas traduki sian ŝatatan verkon, pere de kiu li prezentas sian landon, povas partopreni en komuna laboro por eldoni apartan beletran libron. Bonvolu traduki rakonton aŭ novelon (ĝis 4-paĝan), skribi iomete pri la verkisto kaj enmeti vian „valoran ŝtonon” en la enhavon de estonta libro. Ni povas fari „kolieron” el niaj ŝatataj verketoj.

Inter multaj verkoj de famaj eminentaj armenaj verkistoj el la pasintaj jarcentoj, por tiu libro mi elektis por traduki unu el miaj favorataj noveloj.

Karaj legantoj, mi volas citi la vortojn de granda armena verkisto, poeto kaj tradukisto Hovanes Tumanjan (1869-1923), kiu diris, ke „*tradukaĵo estas la rozo sub la vitro, preskaŭ ne eblas, ke tradukisto transdonu propran aromon kaj ĉarmon de la originalo*”. Tamen, dank’ al li kaj multaj aliaj, vere eminentaj majstroj, armenaj legantoj ekkonis multajn belegajn verkojn de la tutmonda literaturo.

Kiel montras Esperanto-tradukoj, la „ĉarmo” kaj „aromo” de la originaloj estas senteblaj, kaj ni esperu, ke libroj, laŭ la ĉina proverbo, ĉiam restos „*ĝardeno, kiun ni povas havi en poŝo*”.

Rita Mkrtĉjan  
[mkrtejan005@mail.ru](mailto:mkrtejan005@mail.ru)



**Rita (Hripsime)**

**Mkrtĉjan** naskiĝis en 1954 en Erevan, Armenio. Ŝi estas inĝenierino pri energetiko, interesiĝas pri literaturo, muziko kaj okupiĝas pri tradukado kaj neprofesia ĵurnalismo. Ŝi esperantistiĝis en 1977 kaj partoprenis kvar Universalajn Kongresojn de Esperanto, unu Internacian Junularan Kongreson kaj plurajn Esperanto-renkontiĝojn en diversaj landoj. Antaŭe ŝi instruis Esperanton en organizitaj studgrupoj. Multaj el ŝiaj lernantoj nuntempe aktive agadas en Armenia Esperanto Unuiĝo. Ŝi tradukas poemojn de famaj armenaj poetoj kaj armenajn kantojn en Esperanton kaj jam delonge verkas proprajn poemojn armene, ruse kaj Esperante. Ŝiaj poemoj kaj tradukitaj kantoj ofte aŭdeblas dum Esperanto-renkontiĝoj en Armenio. Krom la verkado, ŝi prezentas prelegojn kaj organizas artajn programojn dum Esperanto-aranĝoj en Armenio. Dum unu el la lastaj Esperanto-semajnoj en Armenio, ŝi organizis grandan fotokonkurson *Amikeco savos la mondon*, en kiu partoprenis esperantistoj el pli ol 20 landoj.

## Spomenka Štimec – la granda damo de la Esperanta literaturo

Spomenka Štimec naskiĝis la 4-an de januaro 1949 en Orehovica apud Čakovec. Post lernado en Varaždina gimnazio, kie ŝi esperantistiĝis en 1964, ŝi diplomiĝis en Zagrebo pri germana kaj franca lingvoj. Samjare, en 1972, ŝi venis al Internacia Kultura Servo (IKS), kie ĝis 1994 ŝi profesie laboros por Esperanto. Ŝi helpis en organizado de la Pupteatra Internacia Festivalo inter 1968 kaj 1982. Ŝi gvidis Esperanto-kursojn en elementaj lernejoj de Zagrebo kaj Velika Gorica. Kun Zlatko Tišljarić, Ivica Špoljarec, Darinka Sović kaj Roger Imbert ŝi aŭtoris la Esperanto-lernolibron por komencantoj – *Udžebnik esperanta* (1978), kiu poste estos konata kiel Zagreba metodo kaj, tradukita en dekelkajn lingvojn, ĝi furoros tra multaj landoj sur ĉiuj kontinentoj. Ŝi kunlaboris kun Esperantaj gazetoj *Heroldo de Esperanto*, *Esperanto*, *El Popola Ĉinio*, *Tempo*, *Monato*. En multaj kroataj gazetoj aperis nacilingve ŝiaj artikoloj kaj raportoj pri Esperanto-vivo. Post 1996 ŝi redaktoras la revuon de KEL – *Tempo*. Ŝi organizis kun lokaj Esperanto-societoj kvar unuajn kongresojn de kroataj esperantistoj en Zagrebo (1997), Varaždin (1998), Osijek (1999) kaj Đurđevac (2000).

De jaroj ŝi estas sekretario de Esperantlingva Verkista Asocio. Ofte ŝi gastprelegis en diversaj landoj kaj gastinstruis pri Esperanto en usonaj universitatoj de Hartford kaj San-Francisko.

En sia familia bieneto (Njeguš), kiu troviĝas en la vilaĝo Hraščina-Trgovišće ŝi aranĝas internaciajn renkontiĝojn kun Esperantaj verkistoj. Ĉiufoje partoprenas kelkdeko da kroataj esperantistoj kaj gravaj gastoj el eksterlando.

Spomenka Štimec estas unu el la plej konataj kaj famaj Esperanto-verkistoj nuntempe. Ŝi debutis per la romano *Ombro sur interna pejzaĝo*, kiu havis



du eldonojn – en 1984 kaj 1996. Kun vigla intereso ĝi estas legata ĝis hodiaŭ. Ĝi estas la romano pri ama rilato inter esperantistoj, kiuj venas el diversaj landoj. Ĝi komenciĝas en la momento, kiam la amo finiĝis, kiam ombroj vualas la internan pejzaĝon de intima kuneco kaj kuna ĉiutageco. La protagonistino devas kunpuŝiĝi



kun diseco kaj ekseco, kiuj rememore penetros fojfoje en ŝiajn klopodojn al kutimiĝi al forlasiteco, akcepti aŭ malakcepti la situacion de eksulino. Ŝi devas malkovri kaj rekoni ĉiujn sentojn kaj reagojn.

Aparte interesa por la legantoj montriĝis la fakto, ke la ĉiutaga vivo okazas meze de Esperantujo. Ĝuste estas rakonto pri esperantistoj, kiuj vojaĝas al kongresoj, korespondas, trovas amon, komencas novan vivon kiel geedzoj malgraŭ ĉiaj diferencoj, kiujn ili klopodas venki, sed povas okazi ankaŭ tiel, ke ili elreviĝas kaj unu forlasas la alian kun ŝarĝo de reciprokaj akuzoj, riproĉoj, plendoj.

En *Ombro sur interna pejzaĝo* manifestiĝis tiu mirinda kapablo de Spomenka Štimec, kiu aperados en ŝiaj postaj verkoj. El centoj, miloj da bagateloj en la ĉiutaga vivo ŝi kapablas eltrovi la plej trafajn kaj signifoplenajn detalojn, kiuj spronas, vekas kaj malbridas la plej intimajn kaj profundajn sentojn ĉe la legantoj:

*Inter lia foriro kaj mia solseno la nokto ekkonstruis sian unuan matenon. Mi revenas liten. La polmo metita subvangan por doni falsan impreson, ke iu ĝin varmigis. Mensogo! Tio estas mi! Mi mem!*

*Diskrete mallumigi la lampon! Neniu movo por ne vekti la triston, kiu laca endormiĝis.*

*Mateno grizigas la ĉambron. Li kutimis fermi ŝutrojn, mi ne. Tial nun la mateno aperas frue kaj grize kolorigas leviĝon.*

*– Vi devas mem fermadi ŝutrojn ĉiuvespere! – komentas la voĉo aferece.*

Precipe impresodona estas la epizodo, en kiu prezentiĝas la feliĉa tempo de kuneco, sed kvazaŭ ombro de ĵaluzo, kulpo kaj maltrankvilo jam etendiĝas super la memoro pri fremda virino – antaŭa kunulino de la edzo. Jen kiel majstre Spomenka Štimec

vestas la turmentajn sentojn de la protagonistino per la simpla lingvaĵo, tamen riĉa je valoroj kaj nuancoj, kiuj pulsas sub la krusto de vortoj:

*Kiam mi alvenis liaurben li diris ke mi konatiĝos kun lia eksedzino. Mi ne tro scivolemis. Ial mi fartis malkomforte. Mi preferus vidi ŝin de malproksime por ne devi paroli kun ŝi. [...]*

*– Ĉu vi volas ke ni vizitu ŝin hodiaŭ? – li demandis iun posttagmezon. Li ne diris ŝin, li uzis ŝian nomon. Mi preferus diri ne, sed mi akceptis. Ĝi iam okazu. Mi atendis dum li laĉis siajn ŝuojn. La laĉado ne longe daŭris. Mi ekdeziris ke ŝi ne estu hejme. [...]*

*Kiel impresas renkonti sian eksedzinon?*


*Ĉu dum konversacio ne enŝteliĝas ilia unua supo el poreo, komune kuirita iun foran posttagmezon? Tiu supo kaj tiu posttagmezo apartenas nur al ili. Neniu povas ĝin kundividi. La fakto, ke mi ĝin enkapiĝis, estis nur vana klopodo, eniri ilian vivon antaŭ ol en ĝi estis mi. [...]*

*Mi pensas pri tio kiom da fojoj Jan malfermadis konserviĵojn por ŝi. Vespermanĝo. Oni serĉas pri iu neŭtrala temo kaj trovas ĝin.*

Post *Ombro sur interna pejzaĝo* aperis kelkaj romanoj pri la intima vivo de protagonisto, kiel *La litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ, *Hetajro dancas* de Eli Urbanová, *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Becker kaj *Adolesko* de Blazio Vaha. Tamen la verko de Spomenka Ŝtimec elstaras stile, allogas per enhavo kaj ĉiam denove estas malkovrata de novaj legantoj.

La novelaro *Vojaĝo al disiĝo* (1990) entenas kontribuojn de Spomenka Ŝtimec al la Belartaj Konkursoj (ekde 1978), kiuj disfamiĝis ŝin. Dudek du mallongaj tekstoj respegulas temojn prenitajn el la „granda vivo”, inter kiuj ne mankas amo, morto, timo, milito kaj paco.


Du aliaj libroj, *Nesenditaj leteroj el Japanio* (1990) kaj *Geografio de miaj memoroj* (1992), prezentas impresojn de la aŭtorino post ŝiaj vojaĝoj tra landoj



de Azio, Ameriko, suda kaj norda Eŭropo. Malte de kaj atentokapte Spomenka Ŝtimec rakontas pri viditaj lokoj kaj pri homoj, kiujn ŝi renkontis dummigre. Ŝia prezentomaniero konsistas en tio, ke ŝi metas diversajn observojn apud siaj pensoj kaj sentoj. Tamen en tiuj klopodoj ne manifestiĝas ĉionsciado de la rakontanto, ankaŭ la legantojn ŝi devigas al la peno konkludi kaj malkovri rilatojn inter homoj kaj eventoj.

En *Nesenditaj leteroj el Japanio* longe impresos kolekto de ses rakontoj *Flustras Hiroŝimo*, kiuj priskribas spertojn de kelkaj viktimoj, kies vivon detruis kaj ŝanĝis la atombombo.

*Kroata milita noktlibro* (1993) enskribiĝas – kvankam Esperantlingve – en aron da



primilitaj verkoj en la kroata literaturo. Skribante ĝin en zagreba senfenestra banejo dum bombatakoj, la aŭtorino prezentas realon, al kiu ĉiu leganto devas vole-nevole rilati per siaj emocioj kaj per la sento de la solidara kuneco kun viktimoj de tiu milito. Surprizas la maniero, laŭ kiu Spomenka Ŝtimec montras la kruelecon de politikaj agoj kaj faroj kaj ilian efikadon sur la vivon de la homoj, sed ankaŭ sur ilian pensadon, kiu foje restas blinda aŭ surda je teruraĵoj okazantaj ambaŭflanke de la batalfronto. Neforgeseblaj estos la rakontoj pri dentisto René, esperantisto pereinta en la disbombita Vukovar aŭ pri Koka, saviĝinta eskape el la koncentrejo de Omarska.



En tiu paĝonombre modesta libro Spomenka Ŝtimec fajlis la propran stilon ĝis nekredibla perfekteco. Ŝia kapablo vekti kaj kapti la atenton de la leganto per malmultaj vortoj pri areto da trafaj detaloj atingis sian pinton.


Kaj longe en la oreloj de ĉiu leganto sonos la vortoj: *Ne gravas, kiu komencis la unua, kiom da fojoj... Mi al neniu koleras, ĉar mia edzo estis mortigita. Ne daŭrigu!... Estu ni la komenco de la paco, pri kiu ĉiuj parolas* – kiujn aŭdigas la vidvino de kuracisto Pero, alia esperantista viktimo, ĉe la enterigo.

La romano *Tena. Hejmo en Mezeŭropo* (1996) estas la provo epizode kaj mozaike prezenti



la vivon de la avino de Spomenka Štimec. En la romano aperas ŝiaj pragevoj, onkloj, bo-praonkloj kaj parencoj. La aŭtorino deziras teksti el la eretoj de ilia vivo la buntan murtapiŝon, kilimon, kiu montras la vivon dum kelkaj generacioj en vilaĝoj kaj urbetoj de neprecize difinebla parto de Mezeŭropo. Tiu ĉi terpeco fariĝis kvazaŭ la Singera bildo pri la pereinta juda vivo, kies centron formis la varsovia strato Krochmalna (Amela). Ŝi uzas la saman manieron, kiel tiu genia juda verkisto. Ŝi klopodas ĉiel konstrui la mondon de Tena, kaj samtempe la mondon de sia propra familio, kun ĉiuj kutimoj, moroj, gustoj, odoroj, koloroj, sonoj, propraj kaj apartaj. Do, gravas ĉiu peceto, ereto de objektoj, ĉiu nuanco de sentoj. Ili devus sproni la tavolojn da memoro ĉe la legantoj kaj tiel elvoki bildojn de la pasinteco el iliaj travivaĵoj kaj emocioj.

Du sekvaj romanoj, *Tilla* (2002) kaj *Hodler en Mostar* (2006), estas kvazaŭ enprofundiĝo en la biografiajn temojn. La protagonistino de *Tilla* estas fama aktorino Tilla Durieux, kiu grandan parton de sia vivo pasigis en Kroatio. Fuĝante kun sia edzo, juda entreprenisto, el Germanujo antaŭ persekutadoj de nazioj, ŝi venis al Zagrebo. Post kiam germanaj trupoj invadis en 1941 Jugoslavion, la edzo de Tilla estis kaptita kaj deportita al Germanujo, kie li pereis, kaj ŝi pasigis ankoraŭ 12 jarojn en la kroata ĉefurbo, sen koni la kroatan lingvon! Ŝi trovis novan amikinson kaj klopodis vivi malgraŭ amaso da obstakloj. En la lasta ĉapitro de la libro *Spomenka Štimec* frandigas al ĉiuj legantoj sian mirindan stilon:



*La najbarino konservis la parfumboteleton de Tilla. Se oni dum suna tago flaras ĝin, nenio sentebblas. Sed aŭtune, kiam la nebulo kovras la korton de Jurjevska kaj kolomboj kunsidiĝas por varmiĝi sur la breton de la ronda tegmenteja fenestro, iu malfortaodoro leviĝas el la botelo. Tiel odoras la pasinteco.* (p. 175).

Pri siaj motivoj skribi la plej lastan romanon, *Hodler en Mostar*, Spomenka Štimec skribis: *Beletre vivigi unu el la modelinoj de F. Hodler por stimuli legantojn interesiĝi pri la reala Hodler patro kaj Hodler filo. Atentigi, ke en Sarajevo, la urbo, kiu ege suferis, troviĝas io rilatanta al nia Esperanta-kulturo.*

En 1914, post la morto de sia edzo, Jeanne Cerani, francino, Hodlera modelino, eklaboris en

lazareto, kie ŝi asistis operaciojn ĉe militviktimoj. Tie ŝi konatiĝis kun Mehmed Ĉiŝić el Mostar (Bosnio-Hercegovino). Ŝi edziniĝis al li kaj ili forveturis kune en Usonon kaj Kanadon. Tie ŝia edzo reprezentis la jugoslavian registaron. Poste ili revenis en Balkanion, kie Jeanne vivis en Beogrado, Mostar, Niŝ. Ŝi malkovris la mondon sovaĝan por la propraj imagoj kaj fremdan kun sia turka mentaleco. Kiam ŝi mortis en 1955 en Mostar, postrestis 280 Hodler-bildoj, kiujn ŝi kolektis aŭ heredis, kiam ŝi estis lia modelino kaj amatino de 1901 ĝis 1916. Tiu kolekto trovis sian lokon en la Artista Galerio en Sarajevo. Kiam en 1978 oni prezentis grandan parton de ĉi tiuj pentraĵoj en Berno, montriĝis, ke unu triono estis fuŝita kaj enhavis surpentraĵojn de Jeanne. Post la militofino en 1992 oni renovigis la difektitajn bildojn kaj rekonstruis la detruitan Sarajevan muzeon, kie tiu ĉi trezoro estas nun prezentata.


Hodler en Mostar estas biografia-historia-geografia rakonto pri Jeanne-Cerani-Ĉiŝić, en kiu Spomenka Štimec majstre kunplektas diversajn veftojn tiel, ke ili interkruciĝas, plidensigante la bildon de la realo.

La legantoj de la revuo *Literatura Foiro* elektis ĉi romanon verko de la jaro 2006. Tiel oni honorigis la aŭtorinon, kies libroj heredis enhave la plej interesan kaj stile la plej majstran, kion dum jardekoj senlace pliriĉigis, perfektigis kaj fajnigis ĉiuj slavaj verkistoj en la Esperanto-literaturo.

Tomasz Chmielik

## ZEO-j

Interesan proponon sendis al nia redakcio **Olga Ŝtajdohar-Pađen** el Zagrebo: *Mi trarigardis malnovajn fotojn kaj trovis tiujn, kiujn mi faris en Gotenburgo en Svedio. Temas pri Esperanto-placo, videbla ankaŭ sur la urba mapo. Ankaŭ ni en Zagrebo havas Zamenhofan straton, kaj certe tiajn lokojn havas pluraj aliaj urboj. Ni invitu la legantojn de Kresko raporti pri tiaj lokoj! Jen, ni volonte faras tion!*



## Du tagoj en Budapeŝto

Ne estas sekreto, ke kroatoj kaj hungaroj havis longan kaj riĉan komunan historion. La samon oni povas diri ankaŭ pri la kroataj-hungaraj esperantistaj interrilatoj. Sed tiuj rilatoj dum lastaj jardekoj tre malfortiĝis kaj apenaŭ ekzistis. En la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar (2011) estis subskribita *Interkonsento pri partnera kunlaboro inter Hungaria Esperanto-Asocio kaj Kroata Esperanto-Ligo*, kiu efektive donis tre magrajn rezultojn. Multe mi cerbumis pri tiu fakto, klopodante kompreni kial Budapeŝto kaj Zagrebo, kiuj geografie troviĝas tiel proksime kaj estas atingeblaj post kelkhora agrabla trajnvojaĝo, neniam el tiu papera dokumento faris realan kunlaboron. Respondon mi ne trovis, sed jam de jaroj mi mem havis fortajn privatajn ligojn kun la hungariaj kaj budapeŝtaj esperantistoj, kaj ekzistis almenaŭ deko da bonaj kialoj por private viziti la hungarian ĉefurbon!

Tia okazo montriĝis januare, kiam mi ricevis afablan inviton de Anjo Amika el Fajsz Amika Rondo (FAR), por prezenti programon en la tiea ĉiumonata Literatura Kafejo. Okazis interkonsento, ke mi prelegu en aprilo, kaj jen – inter la 18-a kaj 20-a mi

pasigis du intereseĝajn tagojn en Budapeŝto!

Mi vojaĝis per internacia trajno, kiun mieniris en Koprivnica, kaj jam post kvin horoj mi atingis Budapeŝton! Neimageble bone funkciis la vojaĝo, ĉar temas pri rapida trajno, kiu en aprilo, antaŭ la balatona turisma sezono, estis preskaŭ malplena kaj haltadis nur en kelkaj stacioj.

Antaŭ la vojaĝo mi dissendis proponon al miaj hungaraj amikoj kaj konatoj, ke mi volonte renkontiĝus kun ili dum mia restado en Budapeŝto, sed, ĉar temis pri labortagoj, nur malmultaj povis pozitive respondi al mi. Inter tiuj malmultaj, certe plej konkrete reagis László Szilvási, verŝajne unu el la plej gravaj tiurbaj aktivuloj. Li proponis esti mia gvidanto dum la posttagmezo kaj vespero de la 18-a kaj antaŭtagmezo de la 19-a de aprilo. Li venis aŭtomobile al la Pensiono *Dominik* en la peŝta parto de la urbo, kie la loĝadon por mi afable organizis Fajsz Amika Rondo.

Tuj kiam li venis, li demandis min ĉu mi estas membro de la Esperanta Civito, ĉar Fajsz Amika Rondo estas parto de ĝia orienta legacio, kaj László, kiu estas proklamita *persona non grata* ĉe la Civito, ne ŝatus



*László Szilvási en la koridoro de Lingvo-Lernejo sub la foto de Ivo Lapenna.*

al mi kaŭzi problemojn kaj ne povus partopreni mian prelegon. Impresis min tia sincereco, kaj mi respondis, ke mi ne estas membro de la Civito, sed mi akceptis la afablan inviton prezenti programon en la Literatura Kafejo, kio estas tute normala reago de mi kiel Esperanto-eldonisto. Mi aldonis, ke la agad-platformo KRESKO, kiun mi kreis kune kun Radenko Milošević, faciligas al mi kunlabori kun ĉiuj, kiuj montras



*La Interkonsento de HEA kaj KEL el 2011 kaj la prezidantoj de ambaŭ organizaĵoj en la momento de ĝia subskribado (Fotis: Jozo Lovrić)*

utilajn kaj subtenindajn iniciatojn, kaj do mi iasence balancas inter la konfliktantaj partioj ene de Esperantujo, kiel la neŭtrala Svislando inter aliaj landoj. Kaj mi vere havas multajn kialojn por kunlabori kun László Szilvási, kiu inter la unuaj reklamis nian gazeton *Kresko* kaj niajn aranĝojn en Kroatio, eĉ mem partoprenante ilin. Ĝis nun mi nur teorie sciis pri la aktivecoj de László pere de la materialoj troviĝantaj en la reto, sed veninte al Budapeŝto, mi havis la okazon vidi kiel tio vere aspektas.

László nakiĝis en 1957 kaj laŭprofesie li estas merkatikisto, ekonomikisto kaj inĝeniero pri elektroniko. Tamen, li estas profesia esperantisto ekde 1986, kaj en tiu kampo li montris entreprenistajn kapablojn kiel malmultaj aliaj esperantistoj! En lia biografio en interreto troveblas pluraj interesaj faktoj, sed aparte impresis min la Esperanto-Lernejo, kiun li montris al mi la 18-an malfrue posttagmeze. La Lernejo troviĝas ĉe la strato Ŭllói, n-ro 95, en la unua etaĝo de masiva domo, kiajn oni konstruadis en la plej bona tempo de aŭstra-hungara monarkio, kun dikaj muregoj, larĝaj ŝtuparoj, interna vestiblo, kun korto en la mezo kaj altaj plafonoj en ĉiuj loĝejoj. Vere impona konstruaĵo, sed bedaŭrinde ekstere ankoraŭ nerenovigita, pri kio László rakontis al mi iomete bizaran historion. La Lernejo ekstere estas reklamata per tre videbla moviĝanta lumteksto, do ne eblas ne rimarki ĝin.

La ejo en kiu troviĝas la Lernejo treege kontrastas la eksterajn de la domo, ĉar ĝi estas bela kaj granda loĝejo (ĉirkaŭ 100 kvadratmetroj!), adaptita por la bezonoj de la lernado, komforte ordigita kaj ekipita per necesaj helpiloj, meblaro, teknikaĵoj ktp. Jam en la koridoro mi rimarkis du portretojn: dekstre pendas la portreto de unu el la plej famaj hungaraj verkistoj Zsigmond Móricz, kaj maldekstre de unu el la plej famaj esperantistoj – Ivo Lapenna. Kiam mi petis klarigon, László diris, ke la loĝejo antaŭe apartenis al la famega verkisto, kiu ĉi tie vivis, kaj ke li sukcesis



*Lernantoj de la kurso, vizitita en la Lingvo-Lernejo*

sufiĉe favorpreze aĉeti ĝin. Pri Ivo Lapenna László certe havas apartajn simpatiojn, ĉar la samaj portretoj pendas sur muroj de ĉiuj el la tri lernoĉambroj, en kiuj okazadas instruado de Esperanto. Nome, li alte taksas la rolon de Lapenna en la formado de la moderna Esperanto-movado kaj kun fiero montras lian foton al ĵurnalistoj kaj lernantoj.

Kvankam la loĝejo estas posedata de la familio Szilvási, László ludonis ĝin al la esperantistoj je la simbola prezo de unu forinto, kaj ĝi fariĝis Budapeŝta Esperanto-Centro en kiu, krom lia firmao *Lingvo-Studio*, kiu funkciigas la Lernejon,

funkcias ankaŭ la publik-utila *Fondaĵo Eszperantó* kaj *Kultura Esperanto-Asocio*. Krom la tradiciaj kursoj oni funkciigas ankaŭ pagan (!) interretan kurson de Esperanto. La tradiciajn kursojn vizitas jare ĉ. 150-180 personoj, la interretan 400-500 personoj. En la pasintaj 17 jaroj temas entute pri ĉ. 7300 personoj, kio estas iaspeca rekordo en Esperantujo.

En la momento de nia vizito, nur unu el la tri lernoĉambroj estis okupita. En ĝi funkciis kurso por deko da gejunuloj, kaj László elzis la momenton de mia ĉeesto por iomete paroligi ilin kun eksterlanda esperantisto. En la kurso prelegas Mark, kaj post la unua surprizo la gelernantoj montris tre bonan scion de Esperanto. Nemirinde, ĉar ili pagas la kurson kaj la kursmaterialojn. Por la kurso oni uzas specialan lernolibron, taskokajeron kaj kompaktdiskon, verkitajn de László kaj eldonitajn de la Lingvo-Studio, kies ekzemplerojn la aŭtoro volonte donacis ankaŭ al Dokumenta Esperanto-Centro. Je mia demando, kiom da personoj lernas la lingvon en tiu lernejo, László diris, ke kelkfoje okazas eĉ tri kursoj samtempe, ke tra la lernejo pasis multegaj lernantoj, sed ke la influo de tiuj kursfinintoj al la Esperanto-movado estas relative malgranda, ĉar ili lernas ne pro sia persona simpatio al Esperanto, sed pro la praktika celo: trapasi la lingvan ekzamenon en la proksima Universitato! Tamen, László bone



*Lernolibro uzata en la Lingvo-Lernejo*

adaptiĝis al tiu situacio kaj li trafte respegulas la semantojn el mia frontpaĝa artikolo de ĉi tiu numero de *Kresko!* Neniam oni scias ĉu kaj kiam iu el tiuj finlernintoj revenos al Esperanto!

Kvankam estis jam mal-lumo, László plenumis ankaŭ mian deziron viziti iun el la ZEO-j de Budapeŝto. Li veturigis min al la Esperanto-parko, kiu kuŝas ĉe la strato Hadnagy, proksime al la Elizabeta ponto (*Erzsébet híd*). Tiun parkon starigis la ĉefurbo kaj Hungara Esperanto-Asocio la 8-an de majo 1966, dum la 51-a Universala Kongreso de Esperanto. Antaŭ 500 ĉeestintoj festparolis Nikola Aleksiev (prezidanto de Mondpaca Esperanto-Movado)) kaj d-ro József Dezső, prezidanto de plenumkomitato de la Konsilantaro de la Unua distrikto. Kvankam oni nomas ĝin Esperanto-parko, oficiale ĝi estas sennoma. Ĝi havas memorŝtonon



kun la dulingva (Esperanta kaj hungara) teksto: *Esperanta parko 1966*, kaj flanke: *Je la memoro de la internacia kunlaboro kaj paco okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto*. Apude staras la busto de Zamenhof kaj la nefunkcia fontano, kaj pri la parko László rakontis al mi interesajn aferojn, kiujn mi konservas eble por iu alia okazo.

La tagon ni finis en restoracieto en la urbocentro, gustumante iom el la trinkaĵoj kaj manĝaĵoj tipe hungaraj.

La 19-an antaŭtagmeze László veturigis min al ankoraŭ unu grava loko, la Nacia Fremdlingva Biblioteko, kie troviĝas la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz, unu el tiuj verdaj donkiĥotoj, kiuj la tutan vivon dediĉis al kolektado de Esperantaĵoj. Li okupiĝis pri kolektado inter 1966 kaj 1982,



*Nacia Fremdlingva Biblioteko kaj la Kolektaĵo Fajsz*



kiam la kolektaĵo estis ŝtate protektita. En 2001 la kolektaĵon aĉetis la hungara Ministerio pri edukado kaj transdonis ĝin al la Nacia Fremdlingva Biblioteko. Laŭ iuj asertoj, tiam ĝi estis la kvara plej granda Esperanto-kolekto en la mondo, kun ĉirkaŭ 20.000 objektoj, ĉefe libroj kaj gazet-jarkolektoj.

Kiel juna Esperanto-kolektanto dum la 1980-aj jaroj mi havis intensan interŝanĝan rilaton kun Fajsz, kaj tio estis ankoraŭ unu motivo por viziti la lokon, kie lia kolektaĵo nun troviĝas. La tuto estas vere impona, kaj ĝi situas kiel aparta kolektaĵo en la galerio super la legejo de la Nacia Fremdlingva Biblioteko. Antaŭe la Biblioteko postenigis specialan Esperante parolantan bibliotekiston, sed pro la malgranda intereso de la uzantoj, nun la kolekton prizorgas neesperantista fakulo. Oni ne rajtas pruntadi ion ajn, sed surlokaj esploroj kaj legado estas bonvenaj. Gravaj akcenti

ankaŭ, ke la kolektaĵo funkcias kiel *corpus separatum*, kiu ne plu akceptas novajn materialojn, sed estas konservita en formo, kian al ĝi donis Fajsz mem.

Posttagmeze de la sama tago okazis la afero, pro kiu mi efektive venis al Budapeŝto. La 46-a literatura kafejo, anoncita de Fajsz Amika Rondo okazis je la 18h15 en la OKISZ-inkubatorodomo, en la avenuo Thököly 58-60, kiu efektive situas nur kelkdek metrojn de la Pensiono *Dominik*, en kiu mi loĝis. Atendis min bele aranĝita salono, sed venis nur dekduo da budapeŝtanoj. Tamen, mi ne malĝojis, ĉar inter ili troviĝis miaj bonaj amikoj, el kiuj kelkajn mi ne vidis jam de jaroj. Kiel interkonsentite kun Anjo Amika (kiu bedüride ne ĉeestis pro sia restado en Svislando), mi prezentis la vivon de jungeneracia kroata verkisto Kristian Novak kaj lian furoran romanon *La nigra patrino*, kiun mi tradukis. Ŝajnas, ke mi sukcesis kapti la atenton de la



Dum kaj post la prelego en la Literatura Kafejo (Fotis: Sándor Szalai).

ĉeestintoj, ĉar malgraŭ la longeco de la prelego kaj iomete malfacila temo, inter ili regis intereso kaj okazis ankaŭ aldonaj demandoj.

En la OKISZ-inkubator-domo siajn oficejojn havas kaj la Esperanta Civito kaj Fajsz Amika Rondo. Post la prelego

okazis amika kafumado en unu el tiuj oficejoj. Kvankam mi kunportis plurajn librotitolojn el Kroatio, mi ne kalkulis pri granda vendo, sed, surprize, pluraj libroj estis venditaj! Tio ĉe mi ankoraŭ plifortigis la impreson pri Budapeŝto kiel nia literatura

metropolo kaj revenigis min pense en la tempon de *Literatura Mondo* kaj la Budapeŝta skolo.

Fine mi devas danki al ĉiuj, kiuj ebligis al mi pasigi agrablajn du tagojn en Budapeŝto, kaj mi ne dubas, ke mi tre baldaŭ denove vizitos ĝin!

Josip Pleadin






**LA EŬROPA CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO**

**LA SESA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ**

La 19an de majo je la 11:00  
Konkursa provaŭdo de partoprenantoj

La 20an de majo je la 16:30  
Koncerto de Premiitoj kaj Koncerto de Steloj

Loko: Vroclavo, Zespól Szkół Nr 14 al. Brücknera 10



ENIRO SENPAGA

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: [festivalo.co@gmail.com](mailto:festivalo.co@gmail.com)  
skribante en la temo de la mesaĝo: E-kanto  
aŭ telefone +48 692 551 131, +48 512 456 449,



## Mia unua alfabetlibro en Prelog

La 27-an de aprilo en la Muzeo *Croata Insulanus* de Urbo Prelog, kunlabore kun Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac, estis malfermita la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*. Dum la malfermo parolis la urbestro de Prelog, s-ro **Ljubomir Kolarek**, anstataŭanto de la estro de Intermuria departemento **Josip Grivec**, la kustosino kaj organizantino de la ekspozicio **Iva Kožnjak** kaj **Josip Pleadin** kiel reprezentanto de DEC. La ekspozicio estas organizita okaze de Tago de Intermuria departemento, kaj restos malfermita ĝis la 17-a de majo. Pri la ekspozicio informis la muzea retejo (<https://muzej-croata-insulanus.hr/2018/04/18/moja-prva-pocetnica/>) diversaj gazetoj kaj portaloj, kaj estis eldonita speciala katalogo.





## Dua komuniko

**Konferenceto:** Urba muzeo (*Gradski muzej*) Bjelovar, Trg Eugena Kvaternika 1, <http://www.gradski-muzej-bjelovar.hr/>

**Aliĝilo:** La aliĝilo elŝuteblas ĉe: <http://www.esperanto-bjelovar.hr/>. Pro organizaj kialoj bonvolu nepre aliĝi antaŭ la 20-a de majo 2018, sendante la aliĝilojn al: [esperanto.bjelovar@gmail.com](mailto:esperanto.bjelovar@gmail.com) kun kopio al la konferenca sekretario Edvige Ackermann: [nored@tiscali.it](mailto:nored@tiscali.it)

Aliĝkotizo egalas al 50 kunaĵoj (7 eŭroj). Kroatoj pagu ĝin samtempe kun la aliĝo al banka konto de Društvo esperantista Bjelovara, IBAN: HR 1224020061100615259 ĉe Erste & Steiermärkische Bank. Pro la altaj bankkostoj, alilandanoj pagu surloke.

Ĝis nun aliĝis aŭ anoncisian aliĝon unuopaj esperantistoj aŭ grupoj el Aŭstrio, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio.

**Konferenca(j) temo(j):** Ĉeftemo de la aranĝo estas: *Alp-Adrio kaj Danubio* kaj oni diskutos ankaŭ pri *Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj*. Prelegantoj pri la konferencaj temoj proponu siajn prelegojn, kiuj daŭru maksimume 10 minutojn, kaj sendu ilin en skriba formo al lokaj organizantoj antaŭ la 15-a de majo pro la publikigo en la Konferenca libreto.

La programon pri la konferenca(j) temo(j) gvidos: Edvige Ackermann kaj Janez Zadavec.

**Transporto el kaj al Zagrebo:** Speciala buso por

unutagaj vizitantoj startos el Zagrebo la 9-an de junio je la 7,00 horo el la haltejo por turismaj busoj antaŭ la Ĉefa fervoja stacidomo (*Glavni kolodvor*), Trg kralja Tomislava 12. Laŭplane la sama buso startos el Bjelovar samtage je la 21h00 por retransporti la konferencanojn al Zagrebo. Mendu vian sidlokon ĉe la organizantoj. Prezo de la transporto dependos de la nombro de vojaĝantoj, sed ambaŭdirekta vojaĝo povus kosti proksimume 100 kunaĵojn.

**Atentigo:** Pro la aktualaj riparoj de la fervojaj trakoj, konsilindas veturi al Bjelovar per organizita buso por unutagaj konferencanoj aŭ uzi publikan bustransporton.

**Loĝado:** Se vi bezonas loĝadon en Bjelovar nepre rezervu vian liton antaŭ la 15-a de majo! Detalojn pri la loĝado trovu en la aliĝilo aŭ informiĝu ĉe la lokaj organizantoj.

### PROVIZORA PROGRAMO

#### Vendredo, la 8-an de junio

**12h00** – Akcepto de partoprenantoj kaj disdono de dokumentoj en la ejo de Bjelovara Esperantista Societo (*ul. Ivana viteza Trnskog 12*), loĝigo.

**16h00** – Vizito de la urbo kaj de ekspozicio pri urboj gastigantoj de pasintaj Konferencoj en la Popola Biblioteko *Petar Preradović* (*Trg Eugena Kvaternika 11*).

**18h00** – Vespermanĝo libervola.

**20h00** – Interkona vespero ĉe Bjelovara Esperantista So-

cieto aŭ en bona biertrinkejo.

#### Sabato, la 9-an de junio

**7h00** – Starto de buso el Zagrebo.

**9h00** – Akcepto de partoprenantoj kaj disdono de dokumentoj en la Urba muzeo (*Trg Eugena Kvaternika 1*).

**10h00** – Oficiala malfermo; salutoj de la organizantoj, aŭtoritatoj, reprezentantoj de la grupoj.

**11h00** – Prelegoj pri la konferencaj temoj kaj diskutoj.

**13h00** – Lunĉo.

**14h00** – Generala Asembleo de Esperanto-Rondo

**16h00** – Koncerto de Neven Mrzlečki en la Hotelo *Central*.

**17h00** – Malfrua tagmanĝo.

**18h00** – Kultura kaj amuza programo.

**21h00** – Fermo de la Konferenco kun salutoj al buse forirantaj partoprenantoj; starto de buso al Zagrebo.

#### Dimanĉo, la 10-an de junio

**10h00** – Ekskurso al Daruvar (vizito de la urbo kaj la vinfiro); tagmanĝo.

**Arbo de internacia amikeco:** Ni klopodas organizi plantadon de *Arbo de internacia amikeco*, pri kio ni atendas decidon de urbaj instancoj.

**Lokaj organizantoj:** Pri ĉiuj organizaj aferoj bonvolu skribi al lokaj organizantoj:

[esperanto.bjelovar@gmail.com](mailto:esperanto.bjelovar@gmail.com)

## Laste aperis



Julian Modest

DANCANTA  
KUN ŜARKOJNovelaro, originale verkita  
en Esperanto

9,00 eŭroj



Julian Modest

LA ENIGMA  
TREZORORomano en Esperanto  
por adoleskuloj

6,60 eŭroj



JOSEPH ROTH

HOTELO  
SAVOY

12,00 eŭroj



JUBILEA ELDONO

Julius Zaglay

Songe sub  
pomarbo

18,00 eŭroj

+ 15% sendokostoj

Mendu ĉe: [dec.kroatio@gmail.com](mailto:dec.kroatio@gmail.com)

*Ili jam subtenis  
la kampanjon!  
Ĉu vi sekvos  
ilian ekzemplon?*

### Kampanjo Por deca hejmo de DEC (Listo de briko-aĉetintoj)

#### En februaro 2018:

- 7. Anonima (Germanio)
- 8. Tomasz Chmielik (Pollando)
- 9. Georgi Mihalkov (Bulgario)
- 10. Yu Jianchao (Ĉinio)
- 11. Marijan Benc (Sesvete)

#### En marto kaj aprilo 2018:

SUME:

57 brikoj  
300 brikoj  
10 brikoj  
67 brikoj  
100 brikoj  
10 brikoj  
487 brikoj  
544 brikoj

## Por deca hejmo de DEC!

AĈETU VIAN BRIKON  
KAJ KONSTRUU KUN NI!

Bankkonto de UZE:

Udruga zagrebaĉkih esperantista

HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X



aŭ: *uzes-y* ĉe Universala Esperanto-Asocio

## Mallongaj novaĵoj

**ESPERANTO-TAJA VORTARO:** Antaŭ nelonge **Warut Bunprasert** el la Bangkoka Esperanto-Klubo (Tajlando) preparis mallongan Esperanto-tajan vortaron, kiu ankoraŭ estas en la manuskripta formo, sed certe tre utilos al lernantoj de Esperanto en Tajlando.

**BICIKLA VOJAĜO AL JAPANIO:** Francaj samideanoj Laura kaj Benoît komencis longan biciklan vojaĝon de Francio al Japanio, dum kiu ili intencas traridkikli 25.000 kilometrojn kaj renkonti lokajn esperantistojn.

**Objectif Japon / Per Biciklo al Japanio**

25 000 km tra suda Eŭropo kaj Azio

Esperanto

世界語

Amiĉoj trans landoj

Landoj / Ĉefaj oficialaj lingvoj laŭ la normo de kodoj ISO 639-1

1. Francio	fr	6. Bosnio & Hercegovino	bs	11. Kartvelo	ka	16. Kirgizio	ky, ru	21. Vjetnamio	vi
2. Svisio	fr, it	7. Montenegro	cnr (ISO 639-2)	12. Azerbajĝano	az	17. Ĉinio	cn	22. Ĉinio	cn
3. Italio	it	8. Makedonio	mk	13. Irano	fa	18. Laoso	lo	23. Suda Koreio	kr
4. Slovenio	sl	9. Grekio	gr	14. Turkmenio	tk	19. Tajlando	th	24. Japanio	jp
5. Kroatio	hr	10. Turkio	tr	15. Uzbekio	uz	20. Kambogo	km		

La Ferrière  
Vendée  
France  
UE

Facebook : **Objectif Japon / Per Biciklo al Japanio**  
Espéranto-Vendée : <http://esperanto-vendee.fr/>

**ESPERANTAJ TAGOJ DE KRAKOVO** (Pollando) okazos inter la 1-a kaj 3-a de junio 2018. Temas pri tradicia aranĝo de krakova esperantistaro kun abunda prelega kaj arta programoj. La festo komenciĝos okaze de datreveno de lokiĝo de la iama reĝa ĉefurbo de Pollando. Organizanto: Krakova Societo Esperanto, Kulturcentro de Podgórze, ul. Sokolska 13, PL-30-510 Kraków, Pollando, retadreso: [kse.krakovo@gmail.com](mailto:kse.krakovo@gmail.com)

**KRISOLAJ ESPERANTO-TAGOJ** okazos en Bayamo (Kubo) inter la 23-a kaj 27-a de majo 2018. Temo: *Identeco kaj estonteco de Esperanto*. Subtemoj de prezentotaj prelegoj povas rilati al: Esperanto tra la mondo, lingvo, parolo, rakontoj kaj legendoj de la kuba paroltradicio, projektoj kaj komunumaj praktikoj de la kuba nacio, rakontoj kaj legendoj pri urbaj historioj, nuntempa stato de Esperanto en la regiono. La interesitoj sendu sian preleg-proponon kun titolo kaj 50-vorta resumo al: [cabrerae@infomed.sld.cu](mailto:cabrerae@infomed.sld.cu)

**ILEI KONGRESOS EN HISPANIO:** La 51-a Kongreso de ILEI okazos samtempe kun la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto inter la 22-a kaj 28-a de julio 2018 en Madrido. Pliaj informoj troveblas en la retejo de ILEI: [www.ilei.info](http://www.ilei.info)



### Urba premio al profesoro Seleš

Dum sia kunsido, okazinta la 28-an de marto, la urba konsilio de Urbo Đurđevac proklamis laŭreatojn de premioj kaj diplomoj por la kuranta jaro.

Inter la laŭreatoj estas ankaŭ profesoro **Zdravko Seleš** (1962), konata kroata esperantisto, kiu ricevis la Oran plakedon *Sveti Juraj*. Li estas premiita kiel pedagogo, verkisto, socia kaj kultura aktivulo. En la klariga teksto, oni elstarigas ankaŭ lian multjaran Esperanto-aktivadon en la kampo de kursgvidado kaj verkado en Esperanto.

### Subskribita kontrakto kun Urbo Bjelovar

La 12-an de aprilo 2018 la prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo, **Franjo Forjan**, subskribis kontrakton, per kiu Urbo Bjelovar atribuis al Bjelovara Esperantista Societo 15.650,00 kunaĵojn. La sumo estas atribuita surbaze de la konkurso por financado de socie utilaj programoj kaj projektoj, publikigita por la jaro 2018, kaj la Societo ricevis la menciitan sumon por organizado de la tradicia renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kiu la sesan fojon okazos en septembro ĉi-jare.





**PONTA FESTO:** Ponta festo estas tradicia Esperanto-aranĝo, okazonta ĵm la dekan fojon en Frankfurt (Odro) en Germanio, 100 km oriente de Berlino, la 1-an de majo 2018. En la festo oni instalos informstandon pri Esperanto nome de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Ligo Berlin. La aranĝo okazos inter 11h00 kaj 18h00 ĉefe en la regiono de la urboponto inter Frankfurt (Odro) kaj Słubice. La partoprenantoj renkontiĝos vespere en agrabla restoracio por komuna babilado. Kaze de malbona vetero oni povos frekventi la kafejon *Słubfurt*. Bonvolu veni multamase pro nia komuna celo – la uzado de Esperanto kiel punta lingvo dum punta festo! Organizanto: [RonaldSchindler@web.de](mailto:RonaldSchindler@web.de)

**AŬTORAJ DUONHOROJ KAJ LIBROJ DE LA JARO EN LISBONO:** Dum la 103-a Universala Kongreso en Lisbono okazos tradiciaj kulturaj programoj *Aŭtoraj Duonhoroj* kaj *Libroj de la Jaro*. La *Aŭtoraj Duonhoroj* okazos en la posttagmezo de dimanĉo, matene kaj posttagmeze de lundo, mardo, ĵaŭdo kaj vendredo. Ili estos bona okazo por interkonatiĝi kun aŭtoroj kaj verkoj, por malkovri legindajn verkojn, por esprimi komentojn kaj demandojn al la aŭtoroj. Kadre de la programero *Libroj de la Jaro* la eldonejoj ricevos la eblecon prezenti verkojn publikigitajn dum la interkongresa jaro (ĉi-kaze, inter la UK en Seulo kaj tiu en Lisbono). Danke al tiu ĉi programero eblos ricevi tre densan trarigardon pri la bunteco de la eldona agado en Esperanto dum la jaro inter la du plej lastaj Universalaj Kongresoj. Se vi interesiĝas doni vian kontribuon, bv. kontakti la retadreson [kulturajprogramerojuk2018@gmail.com](mailto:kulturajprogramerojuk2018@gmail.com) plej malfrue ĝis la 31-a de majo 2018, klare indikante en la temlinio al kiu(j) programero(j) vi intencas kontribui.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA,*  
n-ro 722



**SAT-KONGRESO:** La 91-a SAT-kongreso okazos inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto 2018 en Kragujevac (Serbio). Pliajn informojn serĉu en la retejo de SAT: [www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org) aŭ rekte ĉe lokaj organizantoj: [pilipovickg@gmail.com](mailto:pilipovickg@gmail.com) kaj [radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)

## Informstandoj de SEK en Zagrebo

En 2018 Studentan Esperanto-Klubon (SEK) en Zagrebo gvidos Robert Milijaš kiel prezidanto, Filip Mikuličić kiel vicprezidanto kaj Mihaela Cik kiel sekretario. Dum marto ili organizis informstandojn en la zagrebaj Fakultato pri elektrotekniko kaj komputado (la 12-an de marto) kaj Filozofia fakultato (la 14-an de marto) kun la celo interesiĝi studentojn pri lernado de Esperanto kaj aliĝo al SEK. Vizitantoj de iliaj standoj povis konatiĝi kun la lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba metodo kaj elprovi retajn kursojn de la Internacia Lingvo aŭ Esperantan memor-ludon kontraŭ la deĵorantaj SEK-anoj.

La standon en la Filozofia fakultato vizitis ankaŭ profesoro Velimir Piškorec, kiu esprimis sian kontenton pri la iniciato de SEK-anoj.



## *Pirgo* en la persa kiel naskiĝtaga donaco

La kroata verkistino **Andelka Martić** por sia 94-a naskiĝtago, kiun ŝi festos la 1-an de majo ĉi jare, ricevos specialan donacon: sian porinfanan romanon *Pirgo* en la persa traduko, kiun pere de Esperanto faris Achta Etemadi kaj eldonis la eldonejo Hoopa en Teherano. La unuaj ekzempleroj atingis Kroation antaŭ kelkaj tagoj. La verko estas tradukita sub la titolo *Pirgo kaj partizano Željko*.

Feliĉan naskiĝtagon, sinjorino Martić!

## Marijan Slunjski (1962-2018)

Marijan Slunjski, inter amikoj nomata Ŝunjo, naskiĝis la 3-an de marto 1962 en Bjelovar. Elementan lernejon li finis en Đurđevac, Agrikulturan mezlernejon en Križevci, kaj poste ekstudis en la Agronomia fakultato en Zagrebo, sed ne finis la studadon. Komence li laboris en la komerca entrepreno *Sloga* en Đurđevac kiel magazenisto, poste en la zagreba grundesplora firmao *Geofizika* kaj fine en *CroStella* en Đurđevac kiel kamentubisto. Li havis tre malfacilan vivon, ĉar li devenis el malriĉa familio, trafita de pluraj tragedioj. Lia avo Adolf estis ŝuisto, kiu bankrotis dum la granda ekonomia krizo de la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj, kiu aparte trafis ŝuometiistojn, ĉar la fabriko *Bata* komencis ekspansion de industrie produktitaj ŝuoj. Lia patro Slavko estis invalido kun amputita gambo, kaj la patrino Ljubica en sia lasta vivofazo estis trafita de apopleksio kaj konstante ligita al rulseĝo. Marijan eltenis ĉiujn ĉi tragediojn, flegis la gepatrojn kaj kiam ili forpasis, ankaŭ li estis trafita de malsano, pro kiu li devis frue pensiigi.

Esperantisto li fariĝis en la jaro 1977, en la kurso, kiun Josip Pleadin gvidis en Elementa lernejo *Grgur Karlovčan* en Đurđevac, enkadre de liberaj aktivecoj. Li estis unu el la kunfondintoj de neformala Esperanto-klubo *Bialystok* en Đurđevac en 1978, kaj poste ankaŭ de oficiale registrita junulara Esperanto-klubo *Koko* en 1980. Unu el ĝiaj plej fervoraj membroj li restis ĝis 1990, respektive ĝis la estingiĝo de la kluba laboro, kaŭzita de la Patrolanda milito. Li partoprenis plurajn jugoslaviajn Esperanto-aranĝojn, ĉefe la junularajn unuamajajn renkontiĝojn de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. La militon li partoprenis mallonge, efektive restinte en la fronto ĉe Novska dum unu monato. Li estis engaĝita ekster la bataltrupoj en 1995, post la milita operaco



*Marijan Slunjski (staranta la unua de maldekstre) inter la membroj de Esperanto-klubo Koko dum ekskurso en Bosnio en 1981.*



nomata *Ŝtormo* (Oluja), kolektante la diskurintajn bestojn en la regiono, kie okazadis la bataloj. Por sia partopreno en la Patrolanda milito li ricevis *Medalon de la militoperaco Ŝtormo*.

Post la Patrolanda milito li nemulte okupiĝis pri Esperanto. En la jaro 2000, kiam en Đurđevac okazis la 4-a kongreso de kroataj esperantistoj, li estis membro de ĝia organiza komitato. Ekde 2016 li estis membro de Dokumenta Esperanto-Centro, sed pro tiujara malsaniĝo je kancero, li neniam plu reaktiviĝis.

Kiel emerito li okupiĝis pri siaj ŝatataj hobiaj: fotado kaj kolektado de historiaj kaj etnografiaj objektoj. Fotadon li ekŝatis ankoraŭ en la elementa lernejo, kiam la patro aĉetis al li la unuan fotilon. Serioza foto-aktivado okazis en la lasta jardeko de lia vivo, dum kiu li ricevis laŭdojn inter amatoraj fotistoj kaj foto-ŝatantoj, prezentante siajn fotojn en diversaj konkursoj. Sur sia malnova biciklo, nomata Lujza, li senĉese krozadis tra la regiono de Podravino, vizitante vilaĝojn, la riveron Drava, arbarojn kaj vinberejojn sur la monto Bilogora, kiuj prezentis inspiron por lia foto-laboro. Samtempe, kiel malmultaj fotistoj, li dokumentis per fotoj ĉiujn oficialajn kaj neoficialajn eventojn en la urbo. Siajn fotojn li malavare distribuis en propra Fejsbuka profilo. En 2014 li estis unu el la iniciatintoj de la historia kaj kultura retejo *Podravske širine* (Podravinaj vastaĵoj), kie li estis taskigita kiel foto-redaktoro. En 2016, okaze de Tago de la urbo, li havis la unuan kaj, bedaŭrinde, ankaŭ la lastan personan ekspozicion de fotoj. En 2017, per la decido de urbaj instancoj, li ricevis *Diplomon de Urbo Đurđevac* pro la fervora dokumentado de gravaj lokaj eventoj. Tiam li estis jam serioze malsana.

Kvankam en la lastaj tagoj de lia vivo ŝajnis, ke li resaniĝos, li mortis la 31-an de marto 2018. Akompanita de multaj amikoj kaj honor-salvoj de la Kroata armeo, li estis enterigita en la Urba tombejo de Đurđevac la 3-an de aprilo 2018.

## Emilija Obradović (1936-2018)

La 18-an de aprilo 2018 en Zagrebo, en sia 82-a vivojaro, forpasis **Emilija Obradović**, ankoraŭ unu aktivulino el la malnova generacio de kroataj esperantistoj. Emilija (Katić) Obradović naskiĝis en la vilaĝo Prenj, (komunumo Stolac en Bosnio kaj Hercegovino) la 28-an de septembro 1936, en la terkulturista familio de Nikola kaj Julijana Katić, den. Ojsteršek. Elementan lernejon ŝi finis en Nova Gradiška en 1951, Porinstruistan lernejon frekventis en la jaroj 1951-1955 en Slavonski Brod kaj Pedagogian altlernejon en Zagrebo inter 1958 kaj 1961, studante la kroatian kaj francan lingvojn. La unuan postenon ŝi ricevis en la Elementa lernejo en Staro Petrovo Selo, kie ŝi laboris kiel klasinstruistino en la jaro 1955-1961. Post la finita Pedagogia altlernejo, en 1962 ŝi venis al Elementa lernejo en Nova Gradiška kiel instruistino de la kroata kaj franca lingvoj. Inter 1972 kaj 1977, ŝi studis pedagogion kaj psikologion en la Filozofia fakultato de Sarajevo, kie ŝi fariĝis profesoro de pedagogio kaj psikologio. Kiel lerneja pedagogo ŝi komencis labori ankoraŭ dum sia studado en 1972 en la Elementa lernejo en Nova gradiška, en kiu ekde 1981 ĝis sia emeritiĝo en 1991 ŝi estis lerneja direktorino.

Pri Esperanto ŝi ekokupiĝis en 1953 en la Porinstruista lernejo en Slavonski Brod (en la klaso de profesorino Anja Hurčak). Ŝi estis membro de Esperanto-societo en Slavnski Brod. Dum jaroj ŝi membris en UEA kaj SAT. Kiel esperantistino ŝi aktivis en Staro Petrovo Selo (1956-1962) kaj Nova Gradiška (1962-1979), organizante kursojn de Esperanto por lernantoj kaj plenkreskuloj, ekspoziciojn kaj gastadon de eksterlandaj esperantistoj (ekz. de Gunnar Nilsson el Svedio en Staro Petrovo Selo). Ŝi prelegis pri Kroatio dum sia dumonata restado en Francio (Le Mans kaj Aix-en-Provence) en la tieaj Esperanto-societoj, kaj gvidis korespondadon

de siaj lernantoj kun esperantistoj el diversaj landoj. En 1966 ŝi gvidis lernantojn al Graz, por partopreni la 2-an internacian konferencon de lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata. Tie ŝi gvidis la konferencan programon. Kun la gelernantoj ŝi kunlaboris en la gazeto *Grajnoj en vento*. Pri Esperanto ŝi verkis artikolojn en la enlandaj kaj internaciaj periodaĵoj, aparte fakajn artikolojn pri pedagogio en la monata revuo *Roditelji i škola*.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo ŝi kunlaboris kun Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, kie ekzistas ŝia dosiero D-0402, enhavanta personajn tekstojn, leterojn, artikolojn kaj fotojn.

Ŝi verkis originalan peozion en Esperanto kaj en la kroata lingvo. En la literatura konkurso *Ivo Rotkvić*, organizita de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, en 2014 ŝi gajnis la unuan premion per sia poemo *Sed kial, avinjo*. Samjare ŝi partoprenis en la unua komuna tradukprojekto de kroataj esperantistoj, tradukinte la rakonton de Tibor Sekelj *Generalo rondon, amiko de Indianoj*, kiu aperis en la libro *De Patagonio ĝis Alasko* (Đurđevac, 2014).



Emilija Obradović kun sia kolekto de pupoj, vestitaj per naciaj kostumoj, 1999 (Foto el la kolekto de DEC)



Foto el la arkivo de DEC

Familianoj, parencoj kaj amikoj akompanis samideaninon Emilija Obradović al ŝia lasta ripozejo la 21-an de aprilo en la Centra tombejo en Nova Gradiška.

\*\*\*

### SED KIAL, AVINJO?

Jen, Nino,  
nebuloj sur la ĉielo  
kuregas, rapidegas!

*Sed kial, avinjo?*

Por ke ili  
pli rapide  
al sia celo alvenu.

*Sed kial?*

Por ke la ĉielo  
iĝu densa kaj griza  
pro la nebuloj vagabondoj!

*Sed kial?*

Por ke pluvo  
falu  
sur la teron soifantan  
kaj abunde ĝin surverŝu.

*Sed kial, avinjo?*

Por ke Nino, dujarulo  
en la herbo  
verda, freŝa, mola, rosa  
ĝoje ĝin piedpremu!

## Viaj opinioj

**HO Song (Koreujo):** Mi tre dankas vin pro via sendo de *Kresko*. Ankaŭ iom da miaj konatoj koreaj kaj japanaj esperantistoj ĝuis legi ĝin. Ĝi estas tre fervore redaktata kaj ankaŭ bele.

**Csaba Szányel (Hungario):** Mi tre dankas vin pro tio ke vi sendis al mi la gazeton. Mi legis en ĝi interesan artikolon, nome tiun de Dominique Baron, kiu petis bildkartojn por siaj lernantoj. Do, mi faris mallongan videofilmeton, en kiu mi menciis ke mi legis tiun artikolon en *Kresko* kaj mi petis miajn samlandanojn sendi bildkarton al Dominique. Mi interdividis la filmeton en Facebook kaj Youtube (en la hungara lingvo): <https://youtu.be/M2fz9jwFRfU> Pli ol 800-foje oni rigardis ĝin, kaj pluraj respondis, ke ili certe sendos bildkartojn. Dank' al via gazeto!

**Wysław Beyrowski (Pollando):** Koran dankon pro plua n-ro de via Esperanto-revuo. Estis granda surprizo por mi, ke mi estas en la grupo de la ricevantoj. Multaj kaj interesaj informoj vere min kontentigas. Mi ĝojas scii pri la novaĵoj en Esperantujo.

**Raita Pyhälä (Finnlando):** Kun dankemo kaj plezuro mi legis *Kreskon* 4. Dankegon!

**Luiza Carol (Israelo):** Gratulon pro la belega revuo! Mi tutanime ĝuas kaj plusendas ĝin. Jen mi proponas al vi kontribuon por la revuo. Temas pri poemo kune kun melodio.

**László Szilvási (Hungario):** En la kvara numero mi trovis detalajn informojn pri tri aranĝoj (Alp-Adria Konferenco, MKR, Boatado), kiuj mankis ĝis nun en la Internacia Kalendaro. Unuflanke mi ĝojas aldoni ilin al la internacia turisma kalendaro, espereble ĝi efike helpos varbi eksterlandajn partoprenantojn – aliflanke mi estas malgaja, ĉar la organizantoj ne mem zorgas pri registrado de sia aranĝo... Danke al tiuj informoj mi klopodas iom konigi viajn aranĝojn en Hungario. Vi ja estas proksime al la hungara landlimo, kaj en Hungario lastatempe ne estas similaj Esperantaj aranĝoj... Mi mem fartis tre bone dum la somera Inter-Fest! Sukceson al via agado!

**Henri Masson (Francio):** Koran dankon pro la sendo de *Kresko*. Mi esperas ke ĝi inspiros multajn legantojn. Mi dissendis tiun informon per Facebook, Google+ kaj VK :

*Ni ne konas ĉiujn niajn riĉaĵojn en la Esperanto-mondo. Jam de pluraj monatoj mi ricevas la monatan informilon KRESKO (KRoata ESperantista KOlegaro), kiun eldonas Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE). Lingve kaj stile,*

*enhave kaj aspekte, ĝi estas modela. La prezento estas sobra kaj klara. Redaktas ĝin Josip Pleadin en Ďurđevac.*

*La ĉefartikolo de la 4a numero de 2018 koncernas la savadon kaj konservadon de dokumentoj foje kun grava historia valoro. Jam de ĉ. 40 jaroj ekzistas Dokumenta Esperanto-Centro en Kroatio en Ďurđevac, je 120 km nordoriente de Zagrebo, pri kiu respondecas Josip Pleadin. Sed stoki en sekureco pli kaj pli imponan volumenon da materialo kaj havi eblecon atente prizorgi ĝian ordigon postulas grandan spacon. Pro tio aperas ambicia projekto konstrui veran centron. Sama ambicio estus bonvena en ĉiuj landoj. Senpage elŝutebla ĉe <http://www.esperanto-bjelovar.hr> *Kresko* estas libere distribuebla, kopiebla kaj citebla, vere diskoniginda.*

Tiu informo povas esti interesa ankaŭ por niaj geamikoj Laura kaj Benoît, kiuj ekbiciklis el Vendeo la 3-an de februaro survoje al Japanio. Ilia itinero estas modifebla je kelkdeko da kilometroj depende de la proponoj pri gastigo, kiujn ili ricevos dumvoje. La unua parto estas videbla tie : <https://www.bikemap.net/en/r/4291533/#/z5/46.6946673,25.9057617/terrain>

**Larisa Kuzjmenko (Rusio):** Estis utile legi artikolojn pri la Esperanto-movado kaj laboro en via regiono. Kiel mi komprenis, la klubo de esperantistoj konsistas ankaŭ el maljunaj esperantistoj. En nia urbo N. Tagil nun ne estas vigla movado, tamen en la regiona urbo Jekaterinburgo estas du grandaj kluboj kaj ili aranĝas multajn interesajn renkontojn. Dankon por la gazeto, kaj mi esperas ricevi ankaŭ sekvontajn numerojn.

**Ermigi Rodari (Italio):** Mi elkore dankegas pro via ŝatata komuniko kaj atendas legi estonte vian belan retan revuon (ne estas revueto!)

### KRESKO monata informilo

#### Eldonas:

*Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),  
Jarunska 6, 10000 Zagreb*

#### Retadreso de la redakcio:

*zagreba.esperantisto@gmail.com*

#### Redaktas: Josip Pleadin

*Kresko* aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko* estas libere distribuebla,  
kopiebla kaj citebla.**